

Mortis Yvonne Privat-Bouvier (1891-1977)

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 724, 1977.08.24 & 26 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉiprintempe la svisa kaj tutmonda esperantistaro perdis samideaninon, kiu dum jaroj ludis ĉefrolon, kiel kunulino de unu el niaj plej agemaj pioniroj. Estas Yvonne Privat-Bouvier, kiu mortis la 2-an de aprilo je la aĝo de 86 jaroj. Ŝi postvivis preskaŭ 15 jarojn al sia edzo Edmond Privat, kiu mortis la 28-an de aŭgusto 1962, do ekzakte antaŭ 15 jaroj.

A.- Yvonne Bouvier naskiĝis en 1891 en Ĝenevo ; ŝia patro estis la unua ĉefredaktoro de la grava ĵurnalo *Tribune de Genève*.

Cl.- Kiel junulino Yvonne Bouvier sufiĉe longe restadis en Britio, kies lingvon kaj morojn ŝi ĉiam aprezis. Komence de la unua mond-milito ŝi revenis Ĝenevon, kie ŝi devontigis sin sensalajre labori ĉe la Agentejo de la Milit-kaptitoj de Ruĝa Kruco kun sia amikino Maïa Ferrière, kies patro, doktoro Ferrière, ĝuste estis la fondinto de la koncerna agentejo. Tie ŝi konatiĝis kun la franca verkisto Romain Rolland, oficante ĉe la sama tablo. Ŝi tiam certe ne antaŭvidis, ke ŝi fariĝos lia najbarino dum pluraj jaroj.

A.- Post la milito ŝi fariĝis arkivistino ĉe Ligo de Nacioj. Estas tiam, ke ŝi reintimiĝis kun Edmond Privat, kiun ŝi jam konis ekde la infaneco, ĉar li estis la amiko de ŝia frato Paul. Tri elementoj kunagis por malkovrigi al Yvonne Bouvier kaj Edmond Privat ilian spiritan samecon : la komuna kredo je la paciga efiko de la zamenhofa lingvo, la ŝato por la anglosaksa civilizo, kaj la admiro al Romain Rolland.

Cl.- Edmond Privat edziĝis tre juna kun francino, sed iliaj rilatoj malboniĝis je punkto, ke divorco fariĝis la ununura eliro. En 1926 li edziĝis kun Yvonne Bouvier, kiu ekde tiam kunvivis dum tridek-ses jaroj ĉiujn liajn ideojn, ĉiujn liajn priokupojn, ĉiujn liajn zorgojn. Ŝi estis por li la ideala kunulino, kiu varbiĝis al ĉiuj liaj **aventuroj**, interalie al la subita vojaĝo en Hindion kun Mahatmo Gandhi.

A.- La junaj geedzoj loĝis en Veytaux apud Territet por troviĝi tute proksime de Romain Rolland, kiu havis sian hejmon en Villeneuve. Tiam la geedzoj Privat kaj la gefratoj Romain kaj Madeleine Rolland sin ofte renkontis, sin multe skribis. Ĵus aperis sub la titolo *Bon voisinage (Agrabla Najbarumo)* la korespondado inter Romain Rolland kaj Edmond Privat. Pri tiu ĉi interesa libro lerte komentariita de Pierre Hirsch, la arkivisto de la Dokumentaro Edmond Privat en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, ni parolos dum du venontaj semajnoj honore al la 15-a datreveno de la morto de Edmond Privat, kaj honore al lia edzino Yvonne.

Cl.- Poste la geedzoj migris al la itala parto de Svislando, en Tiĉinon, kie Edmond Privat instruis en la supera komerc-lernejo en Bellinzona. Ili loĝis en Locarno. Estas tie, ke dum la dua mond-milito Yvonne Privat sin oferadis nelacigeble por helpadi centojn da rifuĝintoj, kies dankemo poste esprimiĝis en kortuŝaj leteroj konservitaj en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds.

A.- En 1945 Edmond Privat estis elektita kiel profesoro ĉe la Universitato en Neuchâtel, kaj la geedzoj translokiĝis tien ĉi je la strato Evole ; ilia loĝejo fariĝis pligrimejo por samideaj kvakeroj, esperantistoj, pacbatalantoj, hindoj, mondfederalistoj, kooperativanoj, virin-

defendantoj, ktp. Estas tie, ke mia edzo havis la privilegion ilin renkonti, kiam li estis gimnaziano.

Cl.- Post la morto de sia edzo en 1962 Yvonne Privat volis, ke la idealoj de Edmond Privat, kiuj ankaŭ estis la ŝiaj, daŭre vivu. Tiucele ŝi donacis la geedzan libron kaj dokumentaron al la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, kondiĉe ke ili estu uzataj por fari ekspoziciojn kaj publikaĵojn. Pierre Hirsch, instruisto en la gimnazio de la sama urbo talente plenumis la antaŭviditajn celojn muntante ekspoziciojn, kiuj diskonigis la neordinaran multecon de la interesoj kaj aktivecoj de la geedzoj Privat kaj redaktante artikolojn, kiuj aperadas en fakaj organoj. Ni tre esperas, ke dum la venontaj monatoj li povos konkludi sian arkivistan laboron ekverkante biografion de Edmond Privat. Eble tiun ĉi verkon ni povos lanĉi dum la Universala Kongreso okazonta en Lucerno en 1979, ĝuste je la naŭdeka naskiĝjaro de Edmond Privat.

A.- Antaŭ kvar jaroj, tro malforta por povi resti tute sola, Yvonne Privat forlasis sian hejmon kaj retiriĝis en oldulejon en sia naskiĝurbo. Tie ŝiaj vizitantoj trovis ŝin daŭre humur- kaj interes-plena. En aŭgusto 1976 ŝin frapis apopleksia atako, kaj ekde tiam ŝi restis nekonscia. Tiu malsano malhelpis ŝin ĉeesti la fondon en novembro 1976 de la fondumo Gastejo Edmond Privat en La Chaux-de-Fonds. Kaj ŝi ne povis vidi aperi la libro *Bon Voisinage*, al kiu ŝi tiom sopiris.

Cl.- Yvonne Privat ludis por la disvolviĝo de esperanto rolon, kiun la legantoj de la verkoj de Edmond Privat ofte ne imagas. Lia sekretariino ŝi estis, lia arkivistino ŝi estis, lia helpantino ŝi estis. Kaj kun afableco ŝi gastigis la multnombrajn vizitantojn, kiuj daŭre invadis ilian hejmon en Neuchâtel aŭ ilian ĉaledon en Gland apud la Ĝeneva Lago.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando honore al la dekkvina datreveno de la morto de Edmond Privat kaj nekrologie al Yvonne Privat. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !